



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA DE T

N-ro 7
1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

REZOLUCIO

La 53-a Universada Kongreso de Esperanto, kunveninta en Madrido la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto 1968, aŭdinte prelegon pri la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj diskutinte en la Unua Generala Kunveno de la Kongreso Raporton pri la Kulturaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio,

1. *Rekomendas* al la Landaj Asocioj kaj al la Landaj Sekcioj de Fakaj Internaciaj Organizaĵoj apartenantaj al Universala Esperanto-Asocio, instigi siajn Registarojn akcepti, konforme al la respektivaj konstituciaj proceduroj, ĉiujn konvenciojn rilatantajn al la Homaj Rajtoj, por kiuj ili voĉdondis, precipe la Pakton pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Pakton pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj kaj la Fakultativan Protokolon al tiu Pakto,

2. *Konstatas*, ke lingva diskriminacio, nome malegala traktado de lingvoj, manifestiĝas kaj sur internacia nivelo (ekz. la laboraj

lingvoj en rilato al la oficialaj, la oficialaj en rilato al ĉiuj aliaj) kaj en kadro de diversaj ŝtatoj, precipe koncerne la lingvoj de minoritataj etnaj grupoj, kio en kelkaj kazoj atingas la formojn de kultura genocido. Kiel ĉiu alia diskriminacio, ankaŭ la lingva esprimiĝas ĉefe en du formoj: objektiva (kaŭzita de la fakto mem de multlingveco) kaj subjektiva (antaŭjuĝoj pri la diskriminacitaj lingvoj kaj pri la kulturaj valoroj kreitaj en ili),

3. *Esprimas sian konvinkon*, ke la lingva problemo en la hodiaŭa mondo, inkluzive la traktatan aspekto de tiu problemo, povas esti efike kaj juste solvita nur per adekvata adopto de la Internacia Lingvo (Esperanto),

4. *Petas* la Centron de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo (London—Rotterdam) dediĉi apartan atenton al la lingva diskriminacio kaj publikigi dokumentojn, studojn kaj artikolojn pri tiu demando,

5. *Komisias* la Estraron de Universala Esperanto-Asocio vaste diskonigi tiun ĉi Rezolucion kaj komuniki ĝin al U.N., UNESCO kaj aliaj internaciaj institucioj, kiel ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj de UN kaj UNESCO kun la peto pri konsidero de ĝia enhavo.

Por la 53-a Universala Kongreso de Esperanto

La prezidantaro:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, Direktoro E. L. M. Wensing, Direktoro E. Carlén, S-ro G. Becker, Prof.

D-ro M. Sancho Izquierdo
Madrid, la 10an de Augusto 1968

Kiamaniere varbi novajn samideanojn?

Kun granda intereso mi legis la artikoleon «Aliaj metodoj bezonataj», de Otto M.-K. Pay en n.ro 3. Tiaj artikoloj montras ke niaj mebroj cerbumas pri niaj problemoj kaj volas kontribui al ilia solvado. Tamen, ĝuste la ideoj, kiujn s.ro Pay prezentas, estas jam delonge provataj.

Multfoje ni klopodis penetri en la idealistajn organizaĵojn per prelegoj kaj informoj, sed nur malofte oni akceptas proponojn de nia flanko. Mi supozas ke se tiuj el niaj membroj, kiuj estas samtempe membroj ankaŭ de tiaj idealistaj organizaĵoj, mem provus proponi al tiuj organizaĵoj ekz. prelegon pri Esperanto, tio havus pli da sukceso, ol kiam tia propono venas «de ekstere», t.e. de la Esperanto-organizaĵoj. N. E. L. provas liveri pretajn tekstojn de

prelegoj al membroj, kiuj ne mem havas sufiĉe da materialo aŭ da tempo por mem prepari la prelegtekston.

La alian ideon de s.ro Pay ni aplikadas de proks. 30 jaroj kaj kun pli da sukceso. N.E.L. pretigis plurajn seriojn de po 3 afablaj leteroj kiel respondoj al diversspecaj demandoj aŭ petoj. Se la ricevinto ne reagis al la unua letero, post du semajnoj ni sendas la duan, kaj poste la trian. Tiajn leterojn ni havas por jenaj kazoj: demando kiel oni povas lerni Esperanto; demando pri koresponda kurso de Esperanto; memorigo al aĉetinto de lernolibro; respondo al ensendinto de la informpeta karto, kiu troviĝas en la lernolibro de Seppik-Malmgren; membrovarbado al plenumintoj de la koresponda kurso kaj de la gazeta kurso.

ÅRHUS

La internaciaj feriaj aŭtunaj Esperanto-kursoj okazos 13. — 19. de oktobro en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ (tute moderna) en Århus, Danlando. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo kaj dum tempo, kiam la proksimaj arbaroj portas sian plej multkoloran veston. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Å b y h ø j, Danlando.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

AGADO

Denove aŭtuno — denove akiva periodo. Sukcesa somero finiĝis. Ĝi donis novajn fortojn, novan inspiron. Hinda samideano prelegvojaĝis en Norvegujo. Sed tio ne sufiĉas. La agadon devas prizorgi ni.

Ne pensu, ke tion faros tiu aŭ tiu — kiu ja ĉiam kutimis agadi! Pensu, ke li eble bezonas helpon. Tiun helpon povas doni vi. Se vi havas monon, tempon, forton aŭ laboremon — ĉio estas bonvena.

Kion bezonas la norvega Esperanto-movado? La respondo estas: forton, fortikon! Ĝi bezonas membrojn. La membraro dum pluraj jaroj malkreskis. Kial? Ĉar la maljunuloj ne juniĝas. Kaj la junuloj forestas.

Do — ni bezonas kursojn. Ni bezonas junulojn. Nun estas la momento de vera agado. Se ĉiu el ni kondukos unu personon al la klubo, la sukceso estos jam granda.

Nur unu personon! Ĉu tio estas neebla?

Letero el Ĉeĥoslovakujo

Rudolf Rychly
Mošnova 11.,
Usti n.L.,
Ĉeĥoslovakio

Tre estimataj samideanoj, Akceptu koran saluton de ĉeĥaj amikoj de nordaj landoj. Mi volus informi vin pri la ekzisto de «Nordlanda societo» en nia urbo Usti n.L. Tiu ĉi societo havas en sia programo informadon pri nordaj landoj/paroladoj, amikaj kunestadoj, projekcioj de filmoj, diapozitivaj ka./; organizado de ekspozicioj, organizado de vizitoj de homoj el nordaj landoj en nia urbo. Nia societo provas speciale organizi ekspoziciojn de nordlandaj pentristoj, grafikistoj ktp./ unu nia membro estas ĉefo de regiona galerio;/ aranĝi vizitojn ĉe niaj pentristoj; aranĝi interŝangajn vizitojn de infanoj kaj plenkreskaj.

Nia teknika urbo Usti nad Labem/ 70 000 loĝantoj/ troviĝas sur la vojo Berlino - Dresdeno - Prago/ 20 km de orient-germana limo/. En la ĉirkaŭaĵo de la urbo troviĝas bela «Ĉeĥa Mez-montaro» kaj «Erc-montaro». El kulturaj memoraĵoj estas en nia urbo burgo «STREKOV» kaj urba preĝejo el 14-a jarcento, en la proksimeco de urbo troviĝas monumentoj el Napoleon-militoj, monumento el 15-a jarcento pri batalo de kruccanoj kontraŭ husanoj.

En la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas multaj muzeoj -ekz. pri ĉeĥaj grenatoj, pri historio stankaj argent-eksploatado.

Mi estus tre dankema al vi, se vi provus informi en via gazeto pri nia societo. Kun ĝojo ni akceptus en nia urbo ankaŭ esperantistojn el nordaj landoj al kiuj ni provas aranĝi ĉe ni restadon ekz. en familioj, ekskursojn en urba

ĉirkaŭaĵo, renkontiĝon kun niaj membroj ktp. Ĉiuj nordlandanoj estus bonvenaj en nia urbo!

Se vi havus iajn petojn pri helpo skribu al ni.

Kun kora saluto
Rudolf Rychly

SCIIGOJ DE N.E.L.

La aŭtuna laboro. La Liga Estraro insiste admonas ĉiujn klubojn kaj membrojn nun fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en sia loko. Absolute ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton en via loko publikigi nian gazetan kurson. Vidu cetere la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por kluboj. — *Oktobro:* La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U.N. — La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizon kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La 53a Uniuersala Kongreso de Esperanto okazos en Helsinko, Finnlando, somere 1969. Detaloj sekvos.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkevarono. Oni okazigis 2 estrarkunvenojn kaj elsendis al la kluboj 2 cirkulerojn. Oni ellaboris jarraporton kaj jarkalkulon 1967 kaj budĝeton 1968. Oni diskutis la aktivecojn de N.E.L. en kombino kun la Jaro de Homaj Rajtoj. Oni nomis John Berggreen reprezentanto de N.E.L. al la kongreso en Madrido kaj proponis Elna Matland kiel reprezentanton de la Norvega Registaro. Reprezentantoj de N.E.L. al la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto estis Harda Danielsen, John Berggreen kaj C. Støp-Bowitz. Oni sendis proponon al la Norvega Radio pri rondtabla konferenco pri Esperanto. Oni ellaboris la planon de la prelegvojaĝo de A. Halder en Septembro. Pro gravaj malfacilaĵoj en la presejo Norvega Esperantisto tre malfruiĝis, sed la situacion savis la firmao A. Sæther, Hamar, kiu ankaŭ estonte transprenos la presadon de la gazeto.

La Liga Estraro.

INFORMOJ DE LA EKZAMENA KOMISIONO.

Ordinaraj aŭtunaj Ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1968. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenon en Oslo, Bergen, Hauge-sund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Novembro.* *Personoj*, kiu faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝiloj*, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.

Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtgirokonto 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por ele-

menta ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de 1' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tion helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono. Ekzamena Komisiono de N.E.L.

C. Støp-Bowitz
prezidanto.

RECENZOJ

«SÆROPPGAVE»
OM ESPERANTO

Nils Chr. Stenseth:
ESPERANTO, et bindeledd mellom folkene.

I de senere år har adskillige gymnasiaster på forskjellige steder i landet valgt Esperanto som emne for den «historiske særøppgave» de må innlevere i siste gymnasieklasse. Nils Chr. Stenseth, medlem av Esperantoklubben i Sarpsborg, begrenset sitt emne en del, nemlig til Esperanto i praktisk bruk. Han sendte en kopi av oppgaven til Norsk Esperanto-Forbund, og vi fant den så god, at vi ble enige om at den kunne tjene som manuskript for foredrag om Esperanto. Det er jo ofte noen av våre medlemmer har anledning

Kampanjo por fortikigo de UEA

UEA estas la reprezenta monda organizaĵo de la neŭtrala Esperanto-Movado, rekonita kiel tia de UN kaj Unesko, kun kiu ĝi havas regulajn konsultajn rilatojn.

Helpu la klopodojn de UEA ĉe internaciaj instancoj per tuja aliĝo kiel individua membro de la Asocio.

til å holde foredrag om Esperanto, men ikke har tid eller materiale til selv å utarbeide et manuskript. Og noen ferdig tekst særskilt om Esperantos praktiske anvendelse har Forbundet hittil ikke kunnet tilby. Stenseth fikk så mangfoldiggjort sin oppgave, og Forbundet har kjøpt inn et mindre opplag, som vi herved tilbyr interesserte for kr. 4,00 (for å dekke mangfoldiggjørelsen).

Heftet innleder med en kort historikk. Så følger avsnitt om verdenskongressene (meget godt, og skrevet av én som aldri har vært på en slik kongress!), om Delegito-systemet, Esperanto i turistvesen, Esperanto ved jernbanene, et avsnitt «Nasjonallitteraturen blir internasjonal», Esperanto i radio, og til slutt noen uttalelser om Esperanto av kjente menn.

Selvsagt kunne man føye til mange flere avsnitt, særlig savner jeg et avsnitt om Esperanto blant de blinde, men en særøppgave bør ikke være for lang, og ikke et foredrag heller. Det hele henger godt sammen og er vel avrundet, fremstillet på en grei og oversiktlig måte, gutten kan faktisk skrive. Ved bruk som foredragsmanuskript kan man jo kutte eller tilføye som man ønsker, men et godt grunnlag vil man i alle fall her ha.

Jeg anbefaler klubber og andre interesserte å kjøpe inn et eksemplar, det vil sikkert komme til nytte.

C. Støp-Bowitz.

Politika eposo

Vladimir Majakovskij:
Bone! Poemo de 1' Okto-
bro. El la rusa K. Gusev.
108-paĝa multobligita ka-
jero. Eldonis: Komisiono
pri Internaciaj Ligoj de
Sovetaj Esperantistoj,
Moskvo 1967.

Vivsigno de esperantistoj en Moskvo — eposo, aŭ kion diri, pri la revolucio en 1917, eldonita okaze de la 50-jara jubileo. Al la 3164 versoj estas 8-paĝa komentario kun koncizaj informoj pri historiaj, geografiaj kaj aliaj faktoj.

Ĉar mi per ekzemplo pli bone ol per priskribo povas doni al la legantoj impreson de la libro, mi citas kelkajn liniojn:

Per
tran-
ĉilo
tranĉu
for
la no-
be-
lon
beston
ni.
Pre-
nu
aĵ-
ojn
do, sinjor',
for,
no-
bela
kompani'!

Tiamaniere la tuta revolucia historio de 1917, inkluzive la Kenrenska regimo estas prikantata. La politika tendenco estas evidenta (Kerenski: «aĉa, malforta nan'»), sed ja estas jubileo.

Haro.

Ĉina geografio

Jen Judi: Konciza Geografio de Ĉinio. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino 1964. 240-paĝa, nebindita. Kun pluraj bildoj kaj mapoj.

Konciza-jes. Kaj dum oni rigardas tiun kajeron, oni pli bone komprenas, ke jen temas ne pri lando, sed pri kontinento. La ĉinoj «okupas ĉirkaŭ kvaronon de la tuta loĝantaro de la mondo . . . La denseco de la ĉina loĝantaro estas meznombro 68 homoj por kvadrata kilometro. Ĝi estas multe pli malalta ol tiu de Britio, Japanio, Hindio k. a. Kompare kun la naturaj kondiĉoj . . . la loĝantaro de Ĉinio ne estas granda.»

La libro unue donas la ĝeneralan priskribon de lando kaj popolo, de topografio, de klimato, vegetaĵoj, riveroj kaj lagoj kaj de vivkondiĉoj.

Poste sekvas la superrigadoj laŭ provincoj.

Ankaŭ en tiu geografia libro la politika propagando estas nekaŝita. Ekzemple en la paĝoj pri «La Tibeta Aŭtonoma Regiono» oni trovas: «Post la paca liberiĝo de Tibeto en 1951, socia reformo ne provis rapide efektiviĝi pro la malhelpo de la reakcia kolektivo de

Tibeto. En 1959, tiu reakcia kolektivo faris armitan ribelon, kiu estis tuj likvidita . . . Nun la tibetanoj strebas por konstrui novan Tibeton kun senlima ĝojo kaj entuziasmo.» (paĝo 200) «Sed antaŭe pro la kruela ekspluatado de la regantaj reakciuloj troviĝis tie neniam moderna industrio» (p. 204).

Estas neeble doni informojn pri ĉiu parto de tia libro. Ĝi estas, en si mem, pruvo pri la grandeco kaj graveco de Ĉinujo. Kaj kiu havas pri tiu giganta lando intereson, povas per tiu libro plej facile trovi la plej necesajn informojn.

R.

El Helsingør:

ESPERANTO — VIVANTA LINGVO

Tiun ĉi someron mi por la unua fojo partoprenis en la Internaciaj Feriaj Kursoj, Helsingør. La hejmo de la kursoj estis La internacia Altlernejo kaj la kursoj daŭris unu semajnon (21.-28/8).

Tie ĉi kunvenis 101 personoj de diversaj landoj. Kelkaj kursanoj havis longan vojaĝon. Profesoro L. Stein venis de San Diego, Kalifornio. Mia edzino kaj mi venis de Tromsø.

Ankaŭ 17 blinduloj partoprenis ĉifoje, kelkaj el Norvegujo. Ĉiuj kursanoj loĝis kaj manĝis en la moderna altlernejo. La instruado daŭris tri horojn ĉiutage kaj estis bona kaj interesa. Estis sufiĉa libertempo por aliaj agrablaj kunvenoj, postagmeze promenoj kaj ekskursoj, vespere filmo, lumbildoj kaj prelegoj. En tiel internacia

medio oni havis bonan okazon por praktiki Esperanton en interparolo. Multaj gesamideanoj bezonas konverscian ekzercon, kaj tie ĉi estis brila ŝanco.

Grandan valoron havis ankaŭ novaj kontaktoj kun homoj el aliaj landoj. Estis amika sincera atmosfero en ĉiuj kunvenoj. Mi ne atendis aŭdi aŭ aŭskulti tiel multe Esperantan parolon kaj babilon! La lingvo glitis fluante el multaj buŝoj, ofte samtempe, speciale ĉe la tabloj en la granda manĝ-cambro kaj en la sidĉambro. Vasta parko bela kun arboj kaj plataj herbobedoj ĉirkaŭas la lernej-konstruaĵojn. Tie la kurasanoj ĝuis promenojn kaj rigardis belegajn rozojn kaj aliajn kreskaĵojn.

L. Friis, — lerta esperantisto kaj verkisto en Danlando — estis la eminenta gvidanto de la aranĝo, kaj li havis bonajn helpantojn kaj helpistinojn. Ne malplej lia edzino estis lia dekstra mano. Mia impresado pri tiuj kursoj en Helsingo kaj la restado tie estas la plej bona. Tial mi rekomendas ilin por aliaj samideanoj kiuj deziras agrablan kaj utilan ferion.

Tre simila al tiu aranĝo estas la Internaciaj Aŭtunaj Feriaj Kursoj en Århus, kiuj komenciĝos la 13-an de Oktobro kaj daŭros unu semajnon. Mi ankaŭ rekomendas la aranĝon en Århus.

Herolv Olsen.

Tajlanda legendo

Iam antaŭ tre tre longe vivadis la reĝo Pajakon en la plej malnova urbo en Tajlando, Nakora Pathom. Li estis gaja reĝo kaj regis grandan landon. Li estis edzece feliĉa, sed kiam la reĝino gravediĝis, ŝi unue vizitis antaŭdiriston, kiu rakontis al ŝi, ke la knabo, kiun ŝi estas naskonta, iam hazarde mortigos sian patron.

Tion aŭdinte la reĝo ordonis, ke la knabinfano estu mortigota tuj post kiam li estos naskita. La servisto de la reĝo tamen ne faris laŭ la ordono de la reĝo, sed prizorgis, ke la knabo estu kaŝata en vilaĝo ne tre malproksime de Nakora Pathom. Ĉi tie li elkreskis kaj fariĝis soldato en malgranda reĝlando, kiu ek militis kontraŭ la reĝo Pajakon. La princo kaj lia patro, la reĝo, renkontiĝis, ambaŭ sur sia elefanto, kaj la fino estis, ke Pajakon mortfalis.

Kiam la princo revenis hejmen, la servisto, kiu iam savis lian vivon, rakontis, ke la mortigito estas lia propra patro. — Kial vi ne rakontis tion al mi pli frue?, diris la princo, kiu kolere mortpikis la serviston.

Jen li pentis kaj iris al monaĥo petante lin pri konsilo. La monaĥo ordonis, ke li, por repagi sian pekon, konstruu la plej altan templon de la mondo. Kaj tiel okazis, ke la pagodo en Nakora Pathom estis konstruata de la princo, kiu fariĝis reĝo, Phaya Pan. Alta 116 metrojn ĝi estas hodiaŭ, post kiam ĝi estis surkonstruata antaŭ 100 jaroj, kaj per

tio ĝi estas unu el la plej grandaj temploj de la mondo.

Kiom malnova ĝi fakte estas, neniu scias, sed la historio rakontas ke eble ĝi estis konstruata antaŭ ĉirkaŭ 2.000 jaroj.

El Stavanger Aftenblad trad. Rudolf Dreyer.

La «MINI»-jupoj estos multekostaj al la brita stato

La «mini»-modo kaŭzis, ke la brita fisko perdos konsiderindajn monsumojn, sed nun la sinjoroj en la impostkontoroj cerbumadis kiamaniere ili ekhavu sian monon. La fakto estas, ke ne estas vendakcizo sur porinfanaj vestaĵoj en Granda Britujo, kaj la ordinara metodo estis mezuri la juplongon ekde la kokso kaj malsupren. Ĝis nun jupoj lon-

gaj pli ol 24 kolorojn estis impostitaj, sed la «mini»-modoj diktas jupojn, kiuj maksimume havu 20 kolorojn. Multokaze ili ne havas pli ol 14 kolorojn, kaj troviĝas jupoj eĉ pli mallongaj, se tiaj entute povus esti nomataj jupoj. La imposta estraro unne estis en kontakto kun la drapindustrio sen ke ĝis nun la problemo estas klarigita. Kelkaj opinias, ke limo je 20 koloroj devas esti «impostlimo», sed aliaj diras ke tio tute ne sufiĉos.

El «Aftenposten» trad. Rudolf Dreyer.

Ni proponas:

SHAKESPEARE: Reĝo Lear

K. Kalocsay brile tradukis

Prezo: bindita kr. 44,—,

broŝurita kr. 35,—

Aldonu 10% por sendkostoj

Eldonejo Esperanto,

Boks 942, Oslo 1.

Kompleta listo de subskribintoj

PROpono AL UNUIĜINTAJ NACIOJ 1966.

NORVEGUJO. PARLAMENTANOJ.

Jo(sef) Benkow, fotomajstro, Bekkestua, Bærum	H (=Dekstra partio)
s-no Gunvor Eker, dommstrino, Larvik	A (=Laborista p.)
Osmund Faremo, iniciatestro, Bygland	A
Rolf Fjeldvær, lerneja inspektoro, Hitra	A (æ, Æ = ä, Å)
Ola Gjengedal, lerneja inspektoro, Herøy (N.)	Kr. F (=Kristana Pop.p.)
Finn Gustavsen, redaktoro, Oslo	SF (=Social. Pop.p.)
Kåre Hansen, konstruaciisto, Tromsø	A
Rolf Hellem, fervoja konfidato, Narvik	A
Lars Holen, hubulo, Alvådal	A
Asbjørn Holm, distrikta sekr. (Marsava Societo) ..	SF adr. Øksnes.

Torger Hovi, hubulo, Øystre Slidre	A (ø,Ø=ö,Ö)
s-no Guri Johannessen, dommastrino, Geilo, Hol	A
s-no Martha Johannessen, dommastrino, Borge	A
Eigil Liane, fervoja laborestro, Kragerø	A
Asbjørn Lillås, personarestro, Nøtterøy	A (å,Å elp. o)
Harald Løbak (hubulo, Trysil	A
Per Mellesmo, ĝardenisto, Nord-Fron	A
Sverre L. Mo, busposedanto, Kvam i Hordaland ..	Kr. F
s-no Margith Munkebye, dommastrino, Bodø	A (y,Y=ü,Ü)
s-no Sunniva Hakestad-Møller, dommastrino, Haugesund	A
Odvar Nordli, distrikta revizoro, Stange	A
Kristoffer Rein, kamparano, Rissa	Kr F
s-no Berte Rognerud, sekcia ĉefino, Oslo	H
Hans Hammond Rossbach, lektoro, Kristiansund N...	V (=Maldekstra p.)
Harald Samuelsen, hubulo, Loppa	A
Torstein Selvik, redaktoro, Bergen	A
Oskar Skogly, distrikta sekr., Lillehammer	A
Anders Sæterøy, hubulo, Surnadal	A
s-no Haldis Tjernsberg, dommastrino, Kongsvinger	A
Steffen Toppe, tenejestro, Åsane	A
Thorstein Treholt, hubulo, Gran	A
Torstein Tynning, kamparano, Porsgrunn	H
Johannes Østtveit, veterinaro, Bø i Telemark	Kr. F
Jakob Aano (elp. o-nu), lektoro, Stavanger	Kr F (aa,Aa=å,Å)
Lars Aasgard (elp. os-gar), disponanto, Lindås	Kr. F

35 reprezentantoj.

PROPONO AL NOBEL-KOMITATO (OSLO) 1968 kaj 1967.
NORVEGUJO. PARLAMENTANOJ *keromaj* (kiuj ne havis
okazon subskribi la supran liston).

Einar Hovdhaugen, kamparano, Ringebu
 Sp (=Centra p.) || Paul Svarstad, kamparano, Stryn | H |

PROPONO AL CARNEGIE-FONDAĴO (HAGO) 1966. Norvegujo.
PARLAMENTANOJ *keromaj* (kiuj ne havis okazon subskribi
la plej supran liston).

Johannes Gilleberg, kand teol., institutestro
 Sp adr. Kvæfjord. |

PROPONO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ 1966.
Norvegujo. MINISTROJ.

Per Borten, ĉefministro, Oslo
 Sp || Kjell Bondevik, ministro por eklezio kaj instr. | Kr F adr. Oslo. |
| Helge Seip, ministro por komunumoj kaj laboroj .. | V adr. Oslo. |
| Egil Aarvik (elp. or-vik), socialministro | Kr F adr. Oslo. |

SAME. EKSMINISTROJ:

Birger Bergersen, eksministro pri instruado
 A || s-no Aase Bjerkholt (elp. o-se), eksmin. pri familioj | A |
Halvard Lange, eksministro pri ekstero	A
Trygve Lie, eksmin., eksĝeneralsekret. de UN	A
Helge Sivertsen, eksministro pri instruado	A

4 ministroj kaj 5 eksministroj.

R.B.P. (kopioj faritaj 20.7.68)

NORDA PRISMO
reaperis

Oni scias, ke D-ro Ferenc Szilágyi estis la fondinto kaj la ĉef-redaktoro de Norda Prismo. Norda Prismo estis lia verko. Ĉe lia morto antaŭ baldaŭ unu jaro la situacio fariĝis tre komplika. Post necesa reorganizo aperis *Memora numero*. Tiun numeron redaktis parte D-ro Szilágyi mem, la alian parton lia edzino Rose Szilágyi, kies devosento estis tre grava helpo por venki la malfacilaĵojn. La movado devas ne perdi Nordan Prismon, kinu estas nun la sola grava revuo literatura kaj kultura.

William Auld, Skotlando, estas elektita nova ĉefredaktoro: ankaŭ Skotlando ja estas norda lando. La aliaj redakcianoj restos: Baldur Ragnarsson, Islando, Johan Hammond Rosbach, Norvegujo, Vilho Setälä, Finnlando, Poul Thorsen,

Danujo. Cetere alvenis en la redakcion Georg Kustocz, Gronlando.

Estas fondita firma organizo *Amikaro de Norda Prismo*, kiu laŭleĝe funkcios kiel eldonanto. Oni pagu la abonon ĉe tiu organizo adreso: Ved Fortunen 16, Lyngby, Danujo, per poŝtĉeko — al n-ro 905 55. Estas grave, ke la sola sendependa kultura revuo povos vivi. Kaj revuo ne povas vivi nur per donacoj — ĝi bezonas abonantojn. Bedaŭrinda stato estas, ke ĝuste en Norvegujo estas tre malmultaj abonantoj.

Oni nenion perdas per abono al Norda Prismo, kiu estas tre valora. La abonprezo estas nur 23 danoj kronoj.

Vi povas peti enpagan provnumeron ĉe la ekspedanto, S-ro Mogens Groth, Br.ø. torv 6, Hvidovre, Danujo. Tiam vi povos mem konstati la kvaliton.

Menciinde ankaŭ estas, ke kun la Memora numero pri D-ro Szilágyi eliris la oficiala eldonaĵo de la Dana ministerio pri eksterlandaj aferoj «*Danio en bildoj*».

Jubileoj

Birger Nordstrand 70-jara

La 24an de aŭgusto 1968 lernejspektoro Birger Nordstrand, Trondheim, fariĝis 70-jara. Li naskiĝis en Trondheim, plenumis la studentan ekzamenon en 1917, la instruistan ekzamenon en Elverum 1919, kaj depost tiam li havis sian laboron en la popollernejoj en Trondheim. En 1948 li fariĝis lernejestro, kaj en 1956 li fariĝis lernejspektoro en Trondheim.

Dum multaj jaroj Nordstrand posedis elstarajn oficojn en la lerneja administracio, en la urba konsilantaro, en Norges Lærerlag, en International Federation of the Teaching Associations (IFTA) kaj en World Confederation of the Organizations of the Teaching Profession (WCOTP).

Nordstrand esperantistiĝis pere de kurso de Ottmar Fischer en 1931, kaj li estis vicprez., sekr., prez. kaj membro de la elekta komitato de Grupo Esperantista de Trondheim. En 1933 li plenumis la superan ekzamenon, kaj deposte li estis membro de la loka Ekzamena Komisiono en Trondheim. Li ankaŭ estis fakdel. de IEL kaj UEA depost 1939.

Nordstrand gvidis plurajn kursojn kaj faris sennombrajn publikajn paroladojn pri Esperanto, sed speciale li fervoris por enkonduki Esperanton en la lernejojn.

En 1957 NEL nomis lin kavaliro de la 2a klaso de PRO MERITO.

Ni sincere gratulas al li, dezirante al li forton kaj sanon por daŭra laboro por nia komuna ideo dum la venontaj jaroj!

LKH

Fino Leif Berg 70-jara

Unu el la plej fervoraj membroj de GET, lektorino Leif Berg, Trondheim, fariĝis 70-jara la 6an septembro 1968. Kiel esperantistino ŝi tamen estas relative juna. Ŝi lernis Esperanton de Madeleine Haudebine en 1950, sed de tiam ŝi plene dediĉis sin al Esperanto.

Ŝi estis vicprez. kaj prez. kaj multjara estrarano de GET kaj kunfondinto de Meza Distrikto de NEL. Ŝi ankaŭ kuntradukis en Esperanton la libron de Helge Thiis: *Nidaros Cathedral* (Thm 1953). Fino Berg estis ankaŭ lerta interpretisto dum publikaj prelegoj de eksterlandaj esperantistoj. Ekde 1958 ŝi estis fakdel. de UEA.

Pro ŝia fervora laboro por nia afero NEL nomis ŝin kavaliro de la 2a klaso de PRO MERITO en 1965, kaj GET nomis ŝin Honora Membro en 1968.

Ni sendas miajn plej korajn salutojn al la jubileulino, esperante ke ŝi ankoraŭ dum multaj jaroj daŭre propagandos por Esperanto!

LKH

Trygve Müller 70-jara

La ĉefa gvidanto de la esperantomovado en Jørpeland, korespondanto Trygve Müller, fariĝos 70-jara la 24an de oktobro 1968. Li naskiĝis en Kristiano kaj lernis Esperanton en Germanujo en 1921, kie li estis membro de la esperantoklubo en Werdau 1921—24. En 1923 li

plenumis esperantoekzamenon ĉe Prof. D.ro Dietterle en Lepsiko. De 1924 li estis membro de esperantoklubo en Novjorko, kie li en 1926 edziĝis al germana esperantistino. Li tiam estis la unua norvego kiu edziĝis al eksterlanda esperantitino. De 1937 li estis del. de UEA en Jørpeland.

En 1938 li fondis la klubon «Pacaj Batalantoj» en Jørpeland, kaj li estis ĝia prez. de tiu jaro! En 1961 li komencis labori pri inaŭguro de Esperantostrato en Jørpeland, kaj la 12an de decembro 1963 lia revo pri Esperantostrato realiĝis. «*Esperantovegen*» en Jørpeland estis la unua en Norvegujo, sed la 24a en la tuta mondo.

En 1951 NEL nomis lin kavaliro de la 2a klaso de PRO MERITO.

Ni sendas al li niajn plej korajn salutojn kaj dankojn okaze de lia jubileo!

LKH

Kongresa Rezolucio II

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Madrid de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1968, kun 1800 partoprenantoj el 40 landoj aŭdis Raporton de S-ro M. Jaumotte pri la situacio de Esperanto sur la kampo de turismo.

La Raporto, bazita grandparte sur la rezultoj de la Enketo farita laŭ decido de la Konsilantaro de la Internacia Akademio de Turismo, klare montras la jam grandan praktikan aplikadon de Esperanto por turismaj celoj.

Preskaŭ 700 turismaj organizaĵoj tra la tuta mondo jam praktike utiligas la Internacian Lingvon

Esperanton eldonante broŝurojn aŭ prospektojn; ŝtataj oficejoj de pluraj landoj jam eldonis Esperanto-filmojn por la propagando de sia landa turismo; radio-stacioj de 19 landoj faris — en 1967 — pli ol 2000 elsendojn en Esperanto por disaŭdigi interalie turismajn novaĵojn; U.N.E.S.C.O., la organizaĵo por Edukado, Scienco kaj Kulturo de U.N., rekonis Esperanton kiel gravan rimedon por kulturaj interŝanĝoj: la fervojaj administracioj de Aŭstrujo, Germanujo, Hispanujo, Finnlando, Italujo, Svislando kaj Jugoslavio utiligas Esperanton por horaroj kaj iliaj praktikaj celoj; pli ol 3500 delegitoj de Universala Esperanto-Asocio en 63 landoj disponigas siajn servojn ankaŭ por turismaj celoj.

Sekve, la Kongreso varme aprobas la Enketon faritan de la Internacia Akademio de Turismo kaj aliĝas al la deziro esprimita de tiom da Fakaj Organizaĵoj, ke la Faka Vortaro de Turismo, en kompetenta eldono de la Akademio, estu pliriĉigita per Esperantotraduko.

La Kongreso esprimas sian altan kaj profundan simpatian al la Akademio, kiu akcelas la pacon per kultura kaj kultivata turismo, same kiel Universala Esperanto-Asocio realigas, interalie, ankaŭ tiun celon per la Internacia Lingvo, kiu ebligas proksimiĝon de la popoloj, prezentante al ĉiuj homoj de bona volo le eblecon por pli bona interkompreniĝo.

Por la 53-a Universala Kongreso de Esperanto

La Prezidantaro:
 Porf. D-ro Ivo Lapenna, Direktoro
 E.L.M. Wensing, Direktoro
 E. Carlen, S-ro G. Becker, Prof.
 D-ro M. Sancho Izquierdo.

Kial «Platirinko»?

En n-ro 1 H. Fr. publikigis tradukon de gazetartikolo pri «la platirinko». La artiklo estas bona kaj interesa, sed kial doni al tiu bela birdo tian monstran nomon?

Ĉiuj organismoj havas sciencan (latinforman, sed ofte grekdevenan) nomon, kaj tiuj, kiujn konas laikoj, havas ankaŭ naci-lingvaj nomojn, simplajn aŭ kunmetitajn. Elektante nomojn por bestoj en Esperanto Zamenhof elektis el ambaŭ fontoj — bedaŭrinde, ĉar li ne estis granda biologo, kaj liaj nomoj ofte estas ne tre sukcesaj. Nu, tion oni apenaŭ plu povas ripari, sed kreante novajn nomojn de organismoj, kiuj ĝis nun ne havis nomojn en Esperanto, oni devas atente studi la tutan problemkomplekson.

Mi opinias ke iam venos la tempo, kiam oni devas doni Esperantan, formon al la sciencaj nomoj, ĉar la latino arĥaikiĝas. Sed apud tiuj sciencaj nomoj, pri kiuj mi de jardekoj okupiĝas, ni bezonas ankaŭ bestnomojn por laikoj. Tiujn bestnomojn oni ĉerpu laŭeble malmulte el la sciencaj, sed precipe el la ekzistantaj nacilingvaj nomoj. Mi ĵus fariĝis membro de la nomkomisiono de Ornitologia Rondo Esperantista, kiu pre-

paras liston de ĉiutagaj nomoj de birdoj.

Revenante al la aktuala ekzemplo mi informu ke la koncerna birdo (Norvege: stokkand) havas la sciencan nomon *Anas platyrhynchos*. La greka vorto «platyrhynchos» sugnifas: platbeka. Sed ankaŭ aliaj organismoj havas platan bekon kaj portas la saman nomon kiel sciencan specian adjektivon. Sekve «platirinko» povas esti plursignifa, kaj al nesianto de la greka lingvo diras nenion pri la besto. La natura Esperanta nomo de la birdo estas: platbeka anaso, tute simple. El tiu nomo ĉiu esperantisto tuj vidas ke temas pri specio de anaso, kaj la adjektivo «platbeka», kiu samtempe estas rekta traduko de la scienca specia nomo, donas informon pri la aspekto de la birdo. Ne ĉiam oni povas tiel rekte traduki la sciencan nomon, sed eble konvenan nacilingvan nomon, aŭ oni devas krei priskriban nomon. Espereble post nelonge aperos listo pri tiaj ĉiutagaj nomoj de tre multaj birdoj, kaj tiu listo certe estos grava helpo por esperantistoj, kiuj skribos aŭ parolos pri birdoj.

C. Støp-Bowitz.

Iom da kritiko

Mi uzas la saman titolon sub kiu aperis prezentado de mia artikolo en N-ro 3/1968, kvankam ĉi-foje mi ne kritikis. Mi deziras laŭdi. Mi deziras plenkore gratuli al JHR pro la tiel senpartia kaj senpasia akcepto de kritiko, kian

oni preskaŭ nenie renkontas en nia gazetaro.

Samtempe mi deziras respondi al «Mond.» kiu starigis demandon koncerne iun frazon, cititan el mia letero. Ankaŭ mi konfesas ke la frazo «Se mi jam kritikis, permesu rimarkon ke . . .» povus esti skribita ankaŭ jene: «Ĉar mi jam kritikis . . .» Ambaŭ frazoj estas bonaj. Estas tamen nuanca diferenco depende de tio kion mi volis diri. La proponita frazo kun la enkonduka vorto «ĉar» signifus ke la antaŭa kritiko estas kaŭzo por menciigi ankaŭ ion alian. Mia intenco ne estis tio. Mi volis diri ke mi ne menciis la preserarojn se estus aliaj, pli gravaj kritikindaĵoj, do mi deziris diri, ke mi nur eluzas la okazon kiu jam ekzistas. Por tiu penso mi preferas la formon de mi uzitan.

A. Sekelj.

Norvega Kroniko

Klubo esperantista en Oslo kunvenis 4/4 en Hjemmenes Vel.

La prez. John Berggren bonvenigis kaj petis pri aprobo de la raportoj pri la lastaj du klubkunvenoj, kaj tio okazis sen rimarkigoj.

C. Støp-Bowitz sciigis ke li volonte akceptos librojn por sendado al argentiaj esperantistoj laŭ peto.

La prezidanto klarigis pri la esperanta gazetaro kaj menciis la nomojn de entute 114 periodaĵojn el 33 landoj, inter ili la plej grav-

ajn kun abonprezoj, rekomendante abonon de minimume 1 eksterlanda esperanto-ĵurnalo.

La ĉefa programero de la vespero estis lumbildprelego de Harda Danielsen pri sia flugvojaĝo ĉirkaŭ la terglobo lastaŭtune. Dum 1-hora treege interesa rakonto ŝi gvidis nin al la plej alogaj landoj: Egiptujo, Hindujo, Japanujo, Pacifikaj Insuloj, Usono kaj multaj aliaj lokoj, samtempe montrante belegajn kolorlumbildojn kiujn ŝi grandparte mem faris dumvoje. Per trafaj preparoloj de la karakterizaĵoj de la unuopaj lokoj ŝi vivigis la vojaĝon tiamaniere ke ni sentis ĉiuj ke ni mem partoprenis la viziton al tiuj ekzotikaj landoj malproksimaj. —

Dum la posta kafopaŭzo oni vigle babilis — kaj kantis laŭ akompano per piano de Marit Delor.

La vespera lotumado enkasigis kr. 58,— kaj la librovendado kr. 39,50. Ĉeestis la kunvenon 25 membroj krom 2 gastoj.

Raportis John Berggren.

Klubo esperantista en Oslo.

2/5.68. La prez. John Berggren deziris koran bonvenon al ĉiuj — kaj precipe al nia honora membro Tharald Dybing, kiu denove estas inter ni post 3-monata restado en malsanulejo.

Otto Prytz prezentis «Sonbendan kalejdoskopon pri Hispanujo». Malantaŭ tiu titolo kaŝis sin kolekto de tipaj popol-kantoj el la diversaj distriktoj de Hispanujo, inkluzive la Balearaj kaj Kanariaj insuloj. Pepita de Caspary asistis

treege humurajn rakontojn de Asbjørn Dybwad: «La koko de Matea» kaj «Verdens Undergang».

Brynhild Østmo gvidis la komanan kantadon: «La Kluba Marŝo», «La Fluanta Tajdo», «Ni kantu, ni kantu» (Marina), «La Patro migras en natur» kaj «Sari Marajs». Carl Støp-Bowitz per tidharmoniko kaj Harald Støp-Boitz per trombono akompanis la kantadon.

Ni trinkis kafon kaj mineralakvon, manĝante nian kunportitan manĝaĵon.

Estis tre bela vetero kaj la 30 membroj kaj 6 gastoj pasigis tre agrablan vesperon en la somerdomo de Eva kaj Carl Støp-Bowitz.

Reportis Harda Danielsen.

akompanante la melodiojn per lumbildoj.

Kelka melodioj fakte similis iomete al norvegaj popolkantoj, sed aliaj sonis strangaj al niaj oreloj. La prezentado kaj komentarioj, kiuj montris la multflankecon de la hispana muziko, estis admirinde bonaj kaj interesaj, kaj la ĉeestantoj forte aplaudis.

Poste la Teatra Grupo prezentis skeĉon «Kio okazis?». Tre bone ludis Gerd Jæger Pettersen (edzino), John Berggren (edzo) kaj Einar Gustavsen (policano). Estis kriminal-skeĉo, amuza, ekscita kaj la fino ege surpriza al la klubanoj, kiuj longe kaj kontente aplaudis. Brynhild Østmo verkis kaj reĝisoris la teatraĵon.

Reportis Harda Danielsen.

Klubo esperantista en Oslo.

Ekskurso al Oxval,
Nesodden, 12/6.68.

C. Støp-Bowitz bonvenigis la ĉeestantojn, kaj donis kelkajn informojn, interalie ke la glumarkoj okaze de Jaro de Homaj Rajtoj estas haveblaj ĉe li je prezo de kr. 1,— por 10 markoj — ankaŭ notoj de La Kluba Marŝo je prezo de 3 kronoj.

La vicprezidanto Thor Magnus Carlsen gvidis la kunvenon.

Otto Prytz prezentis surprizon en formo de intervjuo en la radio kun Per Johan Krogstie pri Fervojista Kongresa en Bulgario — per sonbendo. Li ankaŭ legis du

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —

Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj. — Telefono: 54 727